



EKO 2015-5 sendita al 24an de feb.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, listoj kaj unuopuloj.

AMO 10 – novrola kaj estontoserva

Decas, ke la deka AMO-seminario estu unika. Ni povas nun deklari, ke tiu 'jubilea' seminario pri Aktivula Maturiĝo (AMO) efektive okazos kadre de la Internacia Junulara Festivalo (IJF), longhistoria ĉiujara paska renkontiĝo de la Itala Esperanto-Junularo (IEJ). Tio okazos en *Brusson* (Esperante: Brusson) en alteco de 1300 metroj en la Aosta valo inter la 1a kaj la 7a de aprilo 2015; la seminario okazos ene de tiuj datoj. Informoj pri IJF: (<http://iej.esperanto.it/ijf/?lang=eo>);

La celo de AMO 10 estos **trejni trejnistojn**: altigi la kapablojn de ĝisnunaj trejnantoj kaj varbi kaj lertigi novajn. La gvidonto estos Eliza Popper, la fondinto kaj reprezentanto de la Nacia Junulara Konsilio de Hungario ene de la 30-membra Konsildona Konsilio pri Junularo (*Advisory Council on Youth*) de la Konsilio de Eŭropo. Liza profesie trejnadas trejnistojn tra Eŭropo en seso da regataj lingvoj, unuavice pri interkultura komunikado. En AMO 10, ni koncentriĝos je memmastrumado (tempomastrumado, streĉomastrumado, konfliktsolvado, decidalprenado). Liza estas nun lernanta Esperanton, prepare al la gvidado en Italio, asistate de Veronika Poór, estrarano de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. TEJO flegis kontaktojn kun Liza tra pli ol jaro, rezulte ŝi favorkondiĉe disponigas siajn servojn al ĉi tiu junulara aranĝo. La trejnado okazos kadre de Grundtvig-projekto subvenciita de Eŭropa Unio, helpe de la Torina Esperanto-Centro.



Brava atingo de TEJO; jen unika ebleco trejniĝi kaj signifi antaŭpaŝo por la AMO-programo.

Postnoto: fine, temis pri ordinara seminario, ne por trejni trejnistojn.

AMO 11 en la nordo

Tio okazos intensive inter du tagmezoj en la 14a kaj 15a de majo, tuj antaŭ la nacia sveda kongreso en Uppsala kaj samloke kun ĝi. La temo estos 'Informado'. Okazos preparakunsido en la 14a de marto, kie oni decidus komune la subtenojn kiujn oni traktos en AMO 11. Pli da informoj en la alkroĉaĵo kaj ĉe: <http://esperantosverige.se/eventoj/amo-seminario-pri-informado>

Inter nikaragvaj poetoj

En la urbo Granada, Nikaragvo, ĉiujare okazas granda foiro lige kun la "Festivalo de Poezio". En 2015 dum 7 kompletaj tagoj (15-a ĝis 22-a de februaro) oni atendas viziton de ĉirkaŭ 50.000 homoj. Granda parto el ili venas el aliaj landoj (ankaŭ poetoj). Informoj: <http://esperanto-nicaragua.org/eo/node/184>. En 2015 unuafoje Esperanto-Nicaragua planas aranĝi informstandon. UEA finance subtenas tiun projekton el la buĝeto 'Informado'.

Raporto pri la ĵusa studsesio en la Universitato en Poznano

Jen la raporto pri la dua interlingvistika sesio de la grupo, kiu ekstudis en Pollando en septembro 2014:

http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/interlingvistiko/raporto_feb15.html

Sesa Afrika Kongreso en 2016

Aktualigitaj informoj pri AKE6 estas aldonitaj sur la retpaĝo:

<http://www.esperanto-afriko.org/eventoj.htm>

Babilanto – aperis la deka numero

Jen la plej informiva afrika revuo, preparita kunlabore kun la Afrika Komisiono de UEA. Do, AMO kaj 'Babilanto' ambaŭ festas dekan jubileon! Konkize el la enhavo: p.2 – AMO 7: epopeo finiĝis, alia komenciĝas; Mireille Grosjean vizitis Togolandon; p.3 – Konganoj rolludas en E-filmo pri infanaj rajtoj; p.3 Okazis la 22-a Togolanda E-Kongreso; p.4. – Togolanda voĉo aŭdiĝas ĉe Muzaiko! p.5 Ĉu IJK saltos Afriken en 2017? p.6 – Lufimpu Lukolama Victor: «indas kriza komitato por relanĉo de DKEA (DR Kongo)», – ferme: Omaĝe al Hans Bakker.

La revuo estas elŝutebla per la sekva ligilo: www.esperanto-en-togolando.jimdo.com/babilanto

KER-ekzamenoj – limdato tujas

La prizorgantoj memorigas vin, ke proksimiĝas la limdato por anonci intereson pri okazigo de tutmonda aŭ loka ekzamensio ĝis ĉ. septembro 2015. Ni alvokas ĉiujn, kiuj ŝatus en sia urbo, regiono aŭ klubo okazigi sesion, senprokraste anonci sin. La limdato estas la **28a de FEBRUARO**. La ĉefa tutmonda ekzamentago okazos la 30an de majo, sed estas planata pli ol unu tia tago. Lokaj sesioj estas iam ajn organizeblaj, sed atentu la prepartempon. Legu pli sur la paĝo:

<http://edukado.net/novajhoj?id=527>

Dua intervjuo pri Esperanto en rumana televido

Rumana nacia televida kanalo DIGI 24, dissendis sabaton la 21an de februaro 2015, raportaĵon pri Esperanto en Rumanio preparitan de la ĵurnalistino Alida Mocanu. Vidu ĝin rekte ĉe: myweb.info/digi24 aŭ romani-din-franta.webnode.ro/digi-24-d2/. Intervjuitaj estis d-ro Marian Constatinescu, Marian Vochin kaj Jozefo E. Nagy (ĉiuj delegitoj de UEA). El tri horoj da registraĵoj, la fina filmo daŭris ok minutojn.

8a Mezorianta Esperanto Kunveno

Sekundojn antaŭ komunikfermo alvenas informo, ke aliĝoj por tiu aranĝo en Tunizio, ĵus atingis 50. Kiel jam raportite, okazos tie prezentaĵo pri la AMO-programo kaj foruma sesio kun la vic-prezidanto de UEA pri la asocia laboro.

Kulturo kaj pli en la jubilea UK en Lille

LKK zorgas pri la kultura programo koncerne Francion: okazos deko da prelegoj pri francilataj temoj, projekciado de televidaj elsendaĵoj pri francaj regionoj, seminario pri vino kun gustumado, marŝludo tra la urbo, instruado de la franca lingvo, interkona ludo dumkongresa kaj pluraj ekspozicioj, ekzemple pri la Unua mondmilito kaj Esperanto, poŝtkartaj ekspozicioj (ekz. pri 'Paco - Homaj Rajtoj – Daŭripovo', Serio Oriento-Okcidento, afiŝoj por la esperantologia konferenco, ĝemelaj urboj, muzik-instrumentoj (en fermita loko kun prelego-prezentoj), prentaĵoj kaj la Unua Libro.



Komunikado

La interna retejo www.lille2015.fr en la franca kaj en Esperanto estas suplementata per paĝoj en Facebook kaj Twitter. LKK jam nun dissendas regule gazetarajn komunikojn al pli ol 500 ĵurnalistoj pri Esperanto kaj UK - vidu la retligon sube. Tuj antaŭ la UK okazos gazetara konferenco kun estraranoj en la kongresejo. Dum la UK funkcios kvar fadenoj. LKK prizorgos komunikojn al frankofonio, UEA pri

la eksteraj komunikoj en aliaj lingvoj, same pri regulaj internaj komunikoj al la ricevantoj de la nuna komuniko kaj la kongresa kuriero.

Informado

Estas rezervitaj 200 afiŝlokoj en la urbo Lillo (necesas mem pagi la afiŝojn) kaj aliaj ebloj en la metrolinioj, kie funkcios ankaŭ parolaj anoncoj pri la UK. Banderoloj pendos en diversaj lokoj de la urbo. Informa budo funkcios en la publike alirebla akceptejo de la kongresejo, kune kun iuj ekspozicioj. Kontaktataj estas restoracioj, hoteloj kaj turismaj butikoj kun planoj traduki menuojn, bazajn dokumentojn; almeti bonvenigan Esperanto-afiŝon ĉe montrofenestroj; proponi al la komercistoj inican staĝon en Esperanto por kapabli bazvorte bonvenigi la kongresanojn. Studentoj estas serĉataj por helpi pri tio. Okazos regiona turneo de la kantisto Guillaume Armide: franclingvaj koncertoprelegoj pri daŭripova evoluigo kaj Esperanto (<http://jadeo.net/>) antaŭ kaj okaze de la UK.

Ekskursoj

Detalaj informoj aperas en la Dua Bulteno, tuj eldonota, pli koncize en la marta revuo Esperanto. Ni menciuj nur planojn por piedirado tra la urbo Bulonjo-ĉe-Marŝo ĝis la oficiala ceremonio kaj akcepto en teatro kaj urbodomo, kun memorceremonio sur la placo Zamenhof, kun flagoj kaj banderoloj.

Gazetaraj komunikoj: <http://esperanto-france.org/communiqués-de-presse>). Ĉefe franclingvaj !

La foto maldekstre montras panoramon de Bulonjo-ĉe-Marŝo, la dekstra foto temas pri Lillo



PS : Estonte mi tuj je forsendo de unu komuniko malfermos en alia loko ol la senditaj finaj cirkuleroj, malnetan kolektejon de kandidataj eroj por la sekva cirkulero. Do, ne timu sendi al mi proponojn, pri pli-malpli ajna diskoniginda temo. Krom se temas pri mondsdua (kaj mondinteresa) temo, vi celu inter 3 kaj 5 linioj, kune kun, se eble, utila retligilo! Se alvenas en jam matura formo, vi altigas la verŝajnon, ke mi enprenos ĝin! Por simpligi mian vivon, bv. komenci vian temlinian tekston per 'GAZK' kaj la mesaĝo enhavu nur la kandidatan tekston. Je via servo!

Vortoj: 1175, pretigo: 650 minutoj.

AMO 5 malneta kompilejo.docx iĝas:
La cirk 2015-02-24 AMO 10 kaj multaj temoj.docx kaj pdf

PDF farita de Nuance Power PDF

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.